El arbejo la sango forfluis,
Veston mian ĝi malkulis kaj kronon mian
De moriaj makuloj tute kovris.

De l' Suno filino beleta ploris,
Kaj dum jaroj tri de girlando mia
La mortajn foliojn kunmetis.

II.
Ho Suno, Dia filo,
En kiaj lokoj malfruis vi?
Kie estis vi dum tempo longega
Post lasta adiaŭ la nia?

Tie, ĉe la landoj ekstremaj,
La orfojn mi gardadis,
Paŝtistojn varmigadis,
Car donoj miaj estas sennombraj.

Ho Suno, Dia filo,
Kiu do tie eklumigis
Matenan fajron la vian?
Kiu, vespere, kuŝejon preparis?

Stelo matena kaj stelo vespera,
Matena stelo la fajron eklumigis,
Kaj stelo vespera kuŝejon faris,
Kiu amikojn kaj servantojn miajn kalkulas?

T. Gómez, Hispanujo, Portugalujo kaj Sud-Ameriko,
Ch. Lindley, Svedujo, Danujo kaj Norvegujo,
A. Forstner, Aŭstrio, Svislando kaj Hungarujo,
W. Brodecky, Cehoslovakio, Jugoslavio, Bulgarujo kaj Polujo,
C. Mahlman, Belgujo kaj Nederlando,
G. Sardelli, Italujo.

Edo Fimmen, Sekretario Ĝenerala, samtempe sekretario de la grupo Maristaro.

N. Nathans, 2-a Sekretario kaj samtempe sekretario de la sekcio Fervojistoj.

**Scienco.
Medicino.**

Ĉu kuracilo kontraŭ lepro trovita?

Lepro estas terura malsano, de kiu ĝis nun la homoj, malsaniĝintaj je ĝi, ne povas saviĝi. Oni nur izolais ilin de sanaj homoj, tenante ilin en leprulejoj, ĝis kiam la morto finas la teruran suferon. Sed nun ŝajnas, ke estas trovita kuracilo kontraŭ ĝi, ĉar la faktaj permesas tion esperi.

Preskaŭ ĝis nun oni opiniis, ke lepron kaŭzas bastonsimila bacilo. Sed Profesoro de Tartu (Dorpat) universitato A. Paldrok sukcesis certigi, ke tiuj bastonsimilaj estaĵoj ne estas baciloj, kiel tion jam estas aserintaj hamburga profesoro Unna, sed iaj grajnetoj, kiuj estas kovritaj per albumena kovraĵo (gluza) tiel, ke ili havas formon de bacilo. La citiaj grajnetoj enhavas grasajn substancojn, sed en ilia kovraĵo la grasaj substancoj mankas, kaj ili konsistas el albumeno, kiel dirite. Tiu cirkonstanco prezentis kaŭzon por surpozi, ke lepro antaŭe ne estus kuracebla, ĝis kiam oni ne estus trovinta rimedon, per kio oni povus detrui tiun malhelpantan kovraĵon.

Laborante en tiu rilato, Prof. Paldrok trovis karbacidan neĝon kiel rimedon, per kio oni ŝanĝas la kovraĵon tiom, ke la forioj de homa korpo sukcesas penetri ĝis tiuj ĉi grajnetoj kaj ĉe ili, kiel ĉe fremdaj, al homa korpo ne apartenantaj substancoj, plenumi sian detruan laboron.

Ŝanĝi fluidan karbacidon je neĝo, por tio Prof. Paldrok estas elpensinta aparaton, kiu estas konstruata en Berlin, en granda fabriko de kuracinstrumentoj, kaj patentita en ĉiuj landoj. La aparato ne estas granda, sed ĝia bono estas en tio, ke nun oni ne bezonas fluidan karbacidon tiom multe, kiom sen tia aparato.

La unuajn eksperimentojn per karbacida neĝo Prof. Paldrok faris en kliniko de Tartu universitato jam antaŭ 15 jaroj. Sed nur aŭtune 1922, dum kunveno de societo de estonaj kuracistoj, Prof. Paldrok povis demonstri unu leprulon, ĉe kiu ĉiuj leprosimptomoj estis malaperintaj. Kompreneble tio surprizis aliajn kuracistojn. En jaro 1923 en Tallinn, dum kunveno de militistaj kuracistoj, li montris alian personon, ĉe kiu ne estis nur malaperintaj la simptomoj de la malsano, sed eĉ denove kreskintaj haroj, okulharoj kaj ungoj de mano- kaj piedfingroj, kiuj foriĝas ĉe leprulo dum alta grado de la malsano.

Rezulte tion, la administracio de higieno difinis komisionon, kiu esploru la leprulojn en leprulejoj „Muuli“, kie ili estis kuracitaj laŭ tiu metodo dum 1½ jaroj. La komisiono trovis inter 12 malsanuloj 5 jam tiom saniĝintaj, ke oni permesis al ili iri hejmen. Kompreneble, komence ili restas sub kuracista kontrolo.

La kuracado de malsanuloj estas en tio, ke oni malvarmumigas la malsanan lokon per karbacida neĝo. Komence la leprulo sentas nenion ĉar lepro faras la karnon tiom malsentema, ke la malsanulo, ekz., metante manon al la varmega pordo de forno, ne sentas, ke lia manhaŭto brulidifektigas. Sed saniĝinte malaperas ankaŭ la malsentemo kaj la haŭto fariĝas sentema kiel ĉe sana homoj.

La karbacida neĝo ŝanĝas la kovraĵon ĉirkaŭ la grajnetoj tiom, ke ĝi, sur malvarmumigitaj lokoj, rigardata per mikroskopo, ŝajnas detruiginta. La produktaĵoj, kiuj tie efikas la korpon, estas de la korpo mem translaborata je imunigaĵoj, kaj tio igas la leproĝermojn en la korpo detruiĝi ankaŭ en tiuj lokoj, kie oni ne estas malvarmumiginta per la karbacida neĝo.

Ĝis nun aŭdiĝas ankoraŭ kelkaj suspektemaj voĉoj pri tio, ĉu la resaniĝintaj lepruloj estas fariĝintaj tute sanaj, aŭ apereos la malsano post kelka da tempo denove. Tion ne povas respondi ankaŭ Prof. Paldrok, tion montris estonto.

Unu afero tamen estas certa. Al la lepruloj, kiuj resaniĝis aŭ resaniĝas, estas donita espero, denove vivi inter aliaj sanaj homoj. Kaj se la kruela malsano iom reaperos, ĉu ili ne havas tiam certan kredon, ke denova kuracado per karbacida neĝo denove ebligas al ili saviĝi de la malsano? Laŭ „Nädal“, Tallinn.

Rimarko: Se iu publikigas tiun ĉi artikoleon en naciilingva gazeto, tiam bonvolu sendi unu ekz. de tiu ĉi gazeto por propaganda celo al J. Vahkeri, Luise 1. 5—11, Tallinn, Estonio.

**Arto.
Hans Thoma ĵ.**

La fama pentristo Hans Thoma el la Nigra Arbaro (Germanujo), konata pro siaj pentraĵoj pri popolo kaj hejmo, mortis la 7. 11. Li estis honora civitano de la urbo Karlsruhe kaj ricevis honortombon sur la tiea ĉeftombejo. La majstro estis naskiĝinta en la jaro 1839.

3) La dio de la tondro.

Muziko. Nova gramofono.

Angla kompanio ĵus anoncis gramofonon funkciantan laŭ tute nova plano.

Al la nova maŝino tute mankas la kutima „tonbrako“, reproduskto kaj ekstera aŭ interna trumpeto, sed anstataŭe estas uzata speciala aparato, kiu reproduktas kaj pligrandigas la sonon.

La originalan planon inventis franca sciencisto M. Louis Lumière, sed poste ĝi estis plibonigita de la Gramofona Kompanio de Hayes (elp. Hez), kies teknika spertulo s-o H. Buckle perfektigis la metodon.

Oni pretendas, ke la novaĵo pli fidele kaj pli laŭte redonas la tonojn muzikajn, sed, ĉar la plej malkara maŝino kostas pli ol dudek funtojn, ŝajnas, ke ĝi ankoraŭ ne revoluciigos la gramofonan teknikon.

W. R. W. Torquay.

„Espero“, nova muzikilo.

Nia malnova samideano, gimnazia profesoro Elias Beckman, sukcesis post 4-jara laboro en liberaj horoj konstrui novan specon de kontrabas-

klarneto, kies plej profunda tono estas kontra-C. Ĝi estas nomita Espero. La instrumento, kiu havas formon de bastubo, estas farita el latuno, sed ĝi estas konstruita tiel, ke ĝi, rilate al tono, devas esti karakterizata kiel tipa ligna blovinstrumento. Nenio en la tono memorigas je metalo.

Espero havas 26 aerklapojn kaj amplekson de pli ol kvar oktavoj. Sian plej valoran eon la instrumento posedas per siaj plej profundaj tonoj, kiuj similas al 16-futa orgeno tono.

Kompare al kontrafagolo ĝi havas la super-econ, ke ĝi en la profundo posedas ĉiujn gradojn de forto de fortissimo ĝis pianissimo.

Erho.

Akademio. Korekto.

La prezidanto de la Akademio petas nin korekti, ke en la informo pri la Akademio (ET 216), koncerne la elekton de unu Akademiano, erare estas sciigita: s-o Fiŝer, Bucureŝti. Devas esti: s-o Fiŝer, Leningrad.

Internaciaj Konferencoj 1925 en Paris.

En sia kunsido de 22 okt. la Parisa Komerca Cambro decidis doni sian oficialan protekton al la Internacia Komerca Konferenco (sekvu de la Konferenco de Venezia), kiu estas okazonta dum la Parisa Foiro en majo 1925. S-o André Baudet, membro de la Komerca Cambro, estos ĝia oficiala reprezentanto en la Organiza Komitato.

Samtempe okazos Internacia Sciencna Konferenco organizata de s-o Rollet de l'Isle, pensita generalo-inĝeniero de la franca marino, kaj kunveno de Konstanta Reprezntantaro kaj Int. Komitato de UIEA. (Detala artikolo sekvas en nia venonta numero.)

Granda perspektivo por Esperanto en Ukrainujo.

La lastan tempon Esperanto en Ukrainujo bone disvastiĝas. Tion helpas la Regnaj Kursoj de Esperanto en Kiev, kiuj pere de agentoj kolektas materialon por la „sudsovetuja informaro“ en ĉiuj urboj kaj vilaĝoj de Ukrainujo, Krimeo, Kaŭkazo. Multaj organizaĵoj insistas klopodas ĉe diversaj superaj institucioj pri instruado de la lingvo.

Ni ĝoje sciigas, ke la komisario de Popola Klerigado decidis enkonduki Esperanton, fakultative, en laborlernejoj.

Jen sciigo pri la decido:

Sovetlanda Ukrainujo. Al Rajtigito de la Popola Komisario de Klerigado. Regnaj Kursoj de Ĉefkomitato de Socia Edukado. Esperanto en Kiev. N-o 19871 de 9. 9. 1924.

(Kopio al la gubernia filio de la Komisarierjo). „Laŭ via letero de 14. 8. n.j., Ĉefkomitato de Socia Edukado P. K. K. sciigas, ke laŭ decido de la Scienc-Pedagogia Komitato Ĉ. S. E. internacia lingvo Esperanto estas permisata por instruado en institucioj de la Socia Edukado, kiel fakultativa (ne deviga) lernobjekto.“

Prezidanto de la Ĉefkomitato: Sokoljanski. Sekretario: (subskribo).


Dum la proksimaj tagoj la Komisarierjo aperigos specialan decidon pri enkonduko de Esperanto en superaj k. c. lernejoj.

La Ukraina Asocio Fervojista promesis rekomendi Esperanton al ĉiuj klerig- kaj eduk-organizaĵoj de la transporto.

Tiuj ĉi faktaj havas gravan signifon por la nuna stato de Esperanto en Ukraina Respubliko, ĉar tio donas al la esperantistoj grandan kampon por fruktodona laboro.

Rajtigito de l' Kursoj (Paniŝevski). Sekretario (Kagarlicki).

Aktuala Politiko.



Coolidge

Davis

Coolidge restos Prezidanto de U. S. A.

La balotoj en la Unuigintaj Ŝtatoj de Norda Ameriko rezultigis venkon de la ĝisnuna prezidanto Coolidge. Provizore estas balotitaj nur la elektistoj, kiuj siaflanke elektos la prezidanton ĉe la definitiva elekto. Ili devos elekti la kandidaton nomitan al ili de ilia partio ĉe la partia kunveno. Estas balotitaj entute 589 elektistoj por Coolidge (respublikana partio), 129 por Davis (demokrata partio) kaj 15 por Lafolette (progresista partio). Coolidge ricevis entute ĉ. 18 milionojn da voĉoj, Davis 8 kaj Lafolette 4 milionojn. En la nova Senato estas reprezentitaj 48 respublikanoj, 45 demokratoj kaj 4 progresistoj.

Letero de Francesco Nitti.

la itala samideano, kiu sendis al la eminenta scienculo, aŭtoro de „Eŭropo ĉe la abismo“, la honoresprimon kaj dankemon de esperantistoj pro lia favora juĝo kaj alta koncepto pri Esperanto, ricevis de F. Nitti la skvantan leteron (traduko): Zürich, Hotel Sonnenberg, 24. 7. 24.

Est. Sinjoro!

Tre vive mi dankas vin pro via afabla letero. Mi ankaŭ jam ricevis la publikigaĵojn, kiujn vi tiel ĝentile sendis al mi. La eldonisto ĵus skribis al mi, ke la eldono de de mia libro en Esperanto havas grandan sukceson, kaj nun oni ĝin mendas de ĉiuj landoj.

Hieraŭ mi akceptis tie ĉi afablan delegacion de esperantistoj. Mi alskribas grandan gravecon al la disvastigo de Esperanto kiel komplementa lingvo, eĉ de la politika vidpunkto. Dank' al la granda facilo, je kiu oni povas ĝin lerni, ĝi multe taŭgas por rapide disvastigiki kaj kunhelpi mirigela pacidean propagandon, la disvolvon de la komercaj kaj intelektaj rilatoj inter la plej malproksimaj popoloj.

Mi trus volonte, kiel vi proponas al mi, al la Universala Kongreso al Wien, precipe por aŭdi, kion oni tie diros. Sed mi estas unue tro okupita, kaj tio ne estos ebla al mi, krome mi ne deziras nun viziti la landojn militintajn. Guste por la pacagado intencita de mi, mi devas koncentrigi ĉiujn fortojn al la aliaj landoj.

Dankante vin pro viaj afablaĵoj, mi vin petas kredi min, kun kora manpremo, via Nitti.

Esperanto en New York.

El New York ni ricevis detalan raporton pri la agado de niaj tiaj amikoj. Estas konate, ke en Usono niaj samideanoj havas la plej malfacilan agadkampon, ĉar ĝi estas preskaŭ multlingva lando, kaj oni tie ne sentas multe la bezonon de helplingvo. Pro tio ni ne povas atendi de ili grandajn sukcesojn, sed tiom pli ni devas danki ilin pro ilia fervoro, kiu tamen kelkfoje atingas sukcesojn. — Red.

Unu el la plej malnovaj societoj por disvastigado de nia lingvo estas la New York Esperanto Society, kiu estas ligita al la nacia North American Esperanto Association, kies sidejo estas en Boston, la ĉefurbo de Massachusets. La unue nomita societo deziris disvastigi Esperanton inter la estroj de komercio, industrio kaj lernejoj en nia urbo, sed kiel tia ne havis sukceson. La popolon mem ĝi neniam prilaboris, ĉar se oni akiras komunajn homojn el la amaso, eble ke la alceloj ne venos! La societo konsistas do el ĉ. 25 anoj, kiuj havas ĉiun unuan sabaton en la monato, krom julio, aŭgusto kaj septembro, sian regulan „barcon“ aŭ vesperfestenon en hotelo „Endicott“.

La dua societo, ekzistanta jam 10 jarojn, estas la „Harmonio“, kiu varbis inter popolo kaj laŭ sia devizo: „Vivanta lingvo de vivanta popolo“, ne preterlasas iun okazon fari sian devon por la disvastigado de la lingvo. La barco de tiu ĉi klubo okazas regule ĉiun trion sabaton en la monato, kaj ĉar kelkaj gazetoj raportas pri la afero, venas ankaŭ gastoj, kiuj interesiĝas pri la lingvo. La „Harmonio“ ankaŭ gvidas kursojn, kiuj estis en la fama Washington Irving High

School, sed la nunan jaron oni ne frovis lokon tie. El la gazetoj estis kelkaj, kiuj raportis pri tiuj barcoj, sed la plej amikema el ĉiuj estas la germana gazeto N. Y. Volkszeitung, kiu regule anoncas la barcojn kaj poste raportas pri ili. Tiu gazeto estas socialista kaj fervore anoncas esp. okazajojn, aniaŭe eĉ enhavis esp. instruadon en siaj rubrikoj.

La esp. lingvo estas instruata en la Ferrera Moderna Lernejo de Yorkville, kie infanoj kulturata ankaŭ kantadon krom angle en Esperanto. Ĉe propraj koncertoj aŭ tiuj de la N. Y. Volkszeitung la lernejo gasias kun esp. kantoj, kio donas okazon paroli kaj propagandi la lingvon.

El la unue menciita societo evoluis antaŭ multaj jaroj „Komerca Komuna Lingvo“, kies estro s-o Rufus W. Powell sukcesis ricevi la rekonon de la lingvo ĉe la ĉambro de Komerco por la ŝtato de New York.

Antaŭ du jaroj Esperanto estis instruata en la New York University, la lastan jaron en la City College, kie ĝi ankaŭ nun estas; sed bedaŭrinde ambaŭ institucioj ne donas krediton por la lingvo al studentoj, tial oni ne havas sufiĉe da studentoj por la profesoro. Nur la fama „Columbia“ Universitato en New York havis Esperanton dum la lasta somero en la programo, kun kredito de du poentoj, samegale al la hispana lingvo, kaj la instruisto estis Prof. D-o Thatcher Clark, kiu estas profesoro de la franca lingvo ĉe la sama Universitato. Esperanto tie ne estas instruata dum la vintra kurso, sed oni ree malfermos kurson en proksima somero.

El la „Harmonio“ naskiĝis aparta grupo de S. A. T., kiu daŭris du jarojn en bona laboro, sed pro la severaj leĝoj, kiujn ĝi formis kontraŭ la neŭtrala, la grupo iom post iom malaperis, lasante kvin anojn en la urbo. Sed por ke laboristoj havu almenaŭ ian grupon, kelkaj decidis krei esp. laboristan grupon en New York, kiu nun funkcias tre bone, enhavante laboristojn senrigarde al ilia aparteneco politika, nacia aŭ eĉ religia. Do la grupo kaj la Ferrera Lernejo, kiu lasta estas radikala, telegrafis al la liberaŭstula kongreso en Wien, ke ili krom salutoj rekomendas la akcepton de Esperanto por la oficialigo inter la liberpensantoj.

Antaŭ nelonge la Ferrera Lernejo kantis ĉe la Hungara Laborista Metalunuigo kaj antaŭ la sudslava branĉo de la Laborista Partio, kaj la intereso por Esperanto en ambaŭ grupoj kreskas.

El la „Harmonio“ ankaŭ la prezidanto s-o James D. Sayers perolis jam trifoje per radiofono la fondinto s-o D. A. Klagin unufoje el la stacio WJZ. S-o Sayers havas longan artikolon en la „Radio News“, la plej grava usona radio-gazeto, pri la neceso de nia lingvo. La Radio Relay League en Hartford, Conn., akceptis por nuntempe Esperanton kiel duan oficialan lingvon. Nur unu radio-inĝeniero en Usono s-o Roos kontraŭas Esperanton rekomendante Idon, nun nomatan „Il-o“.

S-o Sayers sukcesis lastan vintron aranĝi esp. ekspozicion ĉe la Radio Ekspozicio en Hotelo Pennsylvania, kie multaj fluglojoj kaj libroj trovis legemajn intereseulojn. Post tio s-o Klagin gvidis klason ĉe la loka grupo de la American Radio Relay League.

Nun estas tre necese ke ĉiu esp. radio-inĝeniero skribu ian ajn artikolon pri nova eltrovaĵo en la radio-fako kaj sendu ĝin al Esperanto Instituto, 1 West 54-th Street. Se la artikolo taŭgas, ĝi estos presata ambulingve, originale t. e. esperante kaj tradukite anglan. La Esperanto Instituto ekzistas de 1909 kaj instruas la lingvon, ankaŭ vendas kelkajn librojn. Ĝia estro estas s-o D. A. Klagin.

Artikoloj por Esperanto ankaŭ aperis en aliaj gazetoj, sed plej longaj en „Der Freidenker“ kaj „Srbobran“.

Antaŭ nelonge alvenis el Germanujo geedzoj Glanders, sed bedaŭrinde s-o Glanders mortis. El Saksujo alvenis s-o Theodor Weder, el Wien s-o Alphonse Pichler, el Hungarujo s-o J. Vichy, el Anglujo s-o Sydney Pugmir kaj el Berlino s-o Otto von Medvey. Ĉiuj estis bonvenaj!

Vigluo.

Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidele kaj kompleta informaro, ni bezonas sciigojn (sur postkarto aŭ aparta folieto antaŭflanke skribita, sed ne inter administrat. aŭ privat. sciigoj) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondicioj: rapide, koncize, fidele, legeble (precipe nomoj).

Raportoj por la kroniko estu koncizaj! La legantoj deziras diversspecan legadon, ne nur kronikajn. Pripensu tion!

Anglujo.

London. Nova kurso sub direkto de Laborista Esp. Klubo Londona estas komencita ĉe junula sekcio de la Meblarista Metia Unio, Okcidenta Londona Filio. Instruisto J. Flower. Enskribiĝis 12 kursanoj.

Francujo.

Lyon. Post sinsekvaj klopodoj de s-oj Leroudier, Mage kaj Levin, laŭ iniciato de la Grupo Esperantista de Lyon, la Lyon'a Sekcio de l' Respublikana Komitato de Komerco kaj Industrio organizis la 5 nov. en la Komerco-Palaco propagandan paroladon de s-o Guéritte, prezidanto de l' franca Komerca Cambro en London, prezidanto de la „Society of Engineers“, prezidanto de l' Federacio de la

Britaj Komitatoj de "Alliance Française", k. a. Ĉestis pluraj membroj de la Komercia Cambro de Lyon kaj aliaj eminentaj industriistoj kaj negocistoj

S-o Guérin, kies sindonemo al nia propagando meritas laŭdan dankon, post tri noktoj en vagaroj porveturita de London al Skollando kaj postea al Sud Orienta Franclando, vigle parolis pri la internacia komercialo, pri la eksportado kaj pri la neceso de internacia helpla lingvo. Per trafaĵoj ekzemploj ĉerpitaj el sia propra longa spertado, li sukcesis interesi kaj konvinki sian aŭdantaron, kiun li aplaudis dankis.

Tiu parolado estis organizita por verbi lernantojn al kurso de la Grupo Esperantista de Lyon (12 rue Alphonse Fochier, ĉiun mardon je la 20 h. 30. depost 18 novembro; enskriboj ĉe Esp. Oficejo, 50 rue Ferrandière).

Par. La 7 nov. okazis en la geologia amfiteatro de la Sorbonne la solena malfermo de la kunveno de la Parisa Grupo Paroladis s-oj Amyonier, prof. kaj L. K., Baudet, membro de la Komercia Cambro, kaj Privat.

Perpignan. La 18. 9. en la bela teatro de "Maison des Oeuvres", la arta sekcio de Amika Rondo (Perpignan) unufoje prezentis antaŭ publiko neesperantista propagandon komedion "L'Héritage Klodarec" de nia samideano F. de Mesnil. (La reprezentado de tiu komedio faras pli efikan propagandon ol la plej bona parolado.) 350 p. ĉestis tiun reprezentadon.

La 30. 10. la duan reprezentadon de la sama komedio ĉestis ĉe 500 lernantoj de la urbo. Ĉe ĉiuj reprezentadoj "La Espero" estis ludata per la orkestro kaj je la fino de la komedio la gaktarioj kantis "Vivu la verda stel". La esp. soc. "Amika Rondo" faris por ĉiuj novajn aliĝojn. Ni devas kore gratuli la sindoneman propagandiston kiun ludis "L'Héritage Klodarec": f. linioj G. Marcellach, P. Pascual, M. Coste; s-oj Jean Lech, René Lech, Pierre Talon, André Vignaud, Joseph Prats.

Germanujo.

Berching (Bavario). Post parolado de s-oj Pilhofer kaj Höhnigsberger el Nürnberg la 26. 10. estas fondita loka grupo de GEa kun 22 membroj. Kurso komenciĝis.

Magdeburg. La nur antaŭ kelkaj monatoj fondita Loka Grupo de la Internacia Virina Ligo por Paco kaj Libereco decidis aranĝi Esperanto-kurson. Kun entuziasmo oni akceptis la proponon, kaj ĉiuj membroj aliĝis. Kurs-gvidantino estas f-lino Toni Simon.

Magdeburg. Ĉe la Esp. klubo Verda Lumo komencis la 7. 11. kurso kun 11 p., gvid. s-ano G. Exner. Esperantemulo en najbarurbeto estas instruita lettere.

Mainz. S-o Läufer komencis kurson en la stenografa kaj en la prelega unuigoj. Parolado de s-o Läufer en la unuigo de la instruistoj; nun 20 instruistoj lernas alian lingvon. S-o Schneider instruas la lernantojn de sia klaso. — Novelekto de la estraro: Prez. s-o Dittmann, kas f-lino Bappenegger, protok. f-lino Engler, gazetaro s-o Gabel, sektr. P. Becker.

Esperanto programo de politika partio.

Nova politika partio respublikana (Deutsche Reichspartei, sekretario Hamburg 57, Innozenzstr. 25) havas en sia programo kiel 3-an punkton: "En ĉiun lernejo de la mondo estu instruata Esperanto apud la gepatra lingvo."

Nederlando.

Bergenoopzoom. Oni sukcesis verbi por Esp. la direktorojn de la granda biskvitulokoj "Liga", kaj intencas enkonduki Esperanton kiel unuan uzobikon korespondingvon en siaj rilatoj kun la tuta mondo. — Pri instruo de Esp. en neŭtrala popollernejo legu sub "Esp. en Lernejo".

Pollando.

Bydgoszcz. Ĉe ĉi tiea popoluuniversitato okazis dimanĉe, la 26 okt. bone vizitata prelego de gimnazia Prof. Sian Krasicki pri "Esperanto en servo de la homero". En la diskuto partoprenis s-oj Chmielewski, Stefan kaj Edmund Fethke. Kontraŭitoj ne ĉestis. La meminita prelego el pedagogiaj rondoj anoncas bonan perspektivon en tiu direkto.

Lublin. Loka Filio de Pola Esp. Asocio forte ekatatis inteligentularon. Presinte en la loka ĉiutaga gazeto "N. Ziemia Lubelska" vicon da presieraritaj artikoloj, oni disgiulis en urbo grandajn afiŝojn anoncantajn pri malfermo de i.n. "Kursoj de Instruistoj de Esperanto" en 25 horoj. — Enskribiĝis 40 personoj, por kiuj oni formis du grupojn; ambaŭ estas gvidataj de s-o Cz. Pruski, del. UEA. — Kunveno de la estraro okazis dimanĉe, la 8 ĝis 9 h. vesp. Grupo "Laboro" ankau pli bone pravas ĉi-lion multnombre vizitataj kunvenoj, kiuj okazas ĉi-dimanĉe de 10 ĝis 12 h. matene (Bernardynska 2. II. p.). Oni preparigas por aranĝo de vespero dum la 15 dec.

Pola Esperanto Servo, Bydgoszcz.

Warszawa. En aŭdencio, kiun havis agoce s-ano A. Oberroman ĉe ĉelo de la Polico, s-o D-o Ularjan Borzelski, ĉi tiu permesis enkonduki Esp. ĉe la polico. Kursoj aranĝataj.

Rusujo.

Bugruslan de Samara gub. 5. 10. en loka socio "Memklorigado" komenciĝis esp. kurso por 20 anoj. Gvid. s-o A. Nikitin.

Carduj (Turkeŝtano). Nova esp. grupo ĉe klubo de fervojistoj.

Ekaterinoslav (Ukrainujo). Esperanto estas instruata oficiale en loka urba lernejo. Gvidas f-lino L. N. Sedakova.

Erivan (Armenio). K-do Sevak oficiale gvidas esp. kursojn en lernejo de Glavprofobr (ĉefa institucio de profesia klerigado).

Vilaĝo Kulakovo de Nov-Nikolaevskoj gub. (Siberio). K-do Puriav gvidas kurson en 5-a grupo de loka lernejo.

Moskva. 19. 10. en Supera Instituto de Fizika Kulturo, kie laboris anoj de Internacia Kongreso de "Sport-intern", estis aranĝita granda esp. ekspozicio. La kongreso akceptis favoran rezolucion por Esp.

Moskva. 23. 10. en granda aŭditorio de Supera Teknika Lernejo okazis tre sukcesa esp. vespero kun raportoj pri nuntepa politika situacio en eksterlando. Parolis k-doj L. Revo (franco), Matevoj (bulgare), Jakovlev, Javoronkov, Eroŝenko (blindulo), Demidov, Nekrasov kaj Valentinov. Vespero finiĝis per kantado kaj deklamado.

Serpuhov de Moskva gub. Novaj kursoj por laboristoj. Gvid. s-o A. Pafomov. Esp. literaturo estas vendata en urba librebro.

Vilaĝo Stakanovskoe de Kurska gub. Kun granda sukceso funkcias grupo kaj kursoj, gvidataj de k-do T. Golovin.

Taşkent (Turkeŝtano). 19. 10. estis aranĝita la Konferenco de Esperantistoj en Meza Azio. Aperis dua numero de ĉiunonata gazeto "Esp. de Oriento".

Tiflis (Georgio). 1. 10. estas organizita Centra Oficejo kaj ĉelo de Esperantistoj ĉe Administracio de Katikazaj Fervojoj.

Vinnica de Podola gub. Rondeto de Esp. ĉe poŝt-oficejo. Gvid. k-do D. Birukov.

Vojsk de Saratova gub. Novan kurson de Esp. gvidas k-do V. Vasiliev.

Sovetlanda Esperanto Servo, Ruslando, Moskvo, poŝtkesto 714.

Ukrainujo.

Kiev. La ĉefkomitato de Profesia Klerigado decidis enkonduki Esperanton, kiel lernobjekton, en lernejoj de la eksterlandaj lingvoj kaj en soci-ekonomial lernejoj de la Ukraina Respubliko, fakultative. Legu pri tio ankau la specialan artikolon en la hodiaŭa numero!

— La movado en Kiev koncentriĝas ĉe la Regnaj Kursoj de Esperanto. Tie ĉi nun funkcias 14 grupoj, meznombro po 12 lernantoj. Unu el la grupoj estas supera instruista. Ĉiuj lernantoj vigle partoprenas praktikajn kluban laboron en rondetoj: dramatika (gvidas s-ino Lukavenko), Marks-scienca de SAT-anoj kaj horo (gvid. s-o Borodinov). En bele ornamita per diversaj esperantoj klubo, oni aperigas grandan murgazeton, kies kunlaborantoj estas preskaŭ la tuta esperantistaro en la urbo.

Cerkasi (Kieva gubernio). Dank' al s-o Rozenoer, komandita el Kiev de la regnaj kursoj, ĉi tie Esperanto komencis forte progresi. Jam funkcias tri kursoj. La loka registaro rilatas al la movado tre favore. Esperantistoj ricevis skrapojn apartajn ĉambrojn en la Centra Laborista Klubejo, kiun nun estas ilumina per diversaj esp. devizoj. La klubo ricevis permeson de la registaro solene donaci al la esperantistaro arte preparitan standardon kun surskriboj: "Proletarioj de la mondo, unuigu!" kaj "Antaŭen kun kredo!"

Svislando.

Bern. La sufiĉe multnombre vizitata ĵarkunveno de nia Esperanto-Societo okazis ja 31 okt. en nia bela nova helmo, Hotelo Metropol. La protokolo de la lasta ĵarkunveno, la ĵarraporto de la prezidanto kaj la kasraporto de la kasisto estis unanime akceptataj. Okazis dumjare 7 estrarkunvenoj; la ĵarkunveno kun festvespero de Svisa Esp. Societo (19 kaj 20 okt. 1923 en Bern); po unu propagand-parolado de nia prezidanto en Bern, Rheinfelden kaj Biel kun sekvantaj kursoj, po unu grupa parolado de niaj membroj s-o D-o Max Ruth kaj s-o Jakob Schmid, raportoj pri la Geneva konferenco kaj la XVI a Esp. Kongreso en Vieno de nia prezidanto; intergrupna rekonfigno kun Neu chätel en Erlach kaj viglaj vendredaj grupaj laboradoj. Eksiĝis 2 kaj aliĝis 5 novaj membroj. La kaso feliĉe saldas kun iom pli ol 100 fk.

La estraro estis unanime reelektata. Ĝi konsistas el D-o Spielmann, prez, Rud Fuchs, sektr., Rob. Bolliger, kas., f-lino Mary Kapfer, bibl. kaj s-o Jakob Schmid kiel grup-gvidanto kaj gazetarportanto. S-oj Schmid kaj Spielmann defendis kaj propagandis ankau dumlastjare Esperanton en la bernaj kaj fakaj gazetoj.

